

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-ro 11 * 11. Dec. 1920

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Kongreso de Japanaj Esperantistoj en Tokio.

(Vidu sur la dua paĝo.)

Je la naskiĝtago de Zamenhof post la mondmilito.

(Deklamata ĉe la Zamenhof-Vespero de Budapeŝt de hungara esperantisto.)*

Nun pri armil' kaj viro, pri paca batalanto
El fund' de l' kor' eksonu laŭdanta nia kanto!
Ĉar kreis li miraklon, la tutan homan genton
Per am' unuigontan miraklan fundamenton.

El mondo de l' barakto, malam', batalo, pelo
Li volis montri vojdon al al' brilanta celo,
Kaj montris li la vojon de l' savo kaj de l' bono!
Sed, ho, orelojn surdajn atingis la admono.

„Ho, mia kor'!“ li kantis, ĉar kaptis lin doloro:
Pro tuta mond' doloris la granda nobla koro,
Por sangverŝanta mondo ĝi sangverŝante batis.
Kaj kun doloro fajra ĝi amis kaj kompatis.

Vir' milda kaj modesta, sed forta kaj decida,
Nek batotoj de la sorto, nek homa mok' perfida
Starigi povis baron al lia fajra senco,
Li luktis per espero, obstino, pacienco.

Kaj en batal' li mortis, se ankaŭ ne per sabro;
Cevalo de l' milito galopis tra l' kadavro,
Lin la Teruro venkis, sur lia freŝa tombo
Baraktis kun pafita flugil' la packolombo . . .

* Noto: Ĉi tiu majstra poemo de D-ro K. Kalocsay parolas en la nomo de la hungaroj, sed same povas senti ĉiuj per la paco ruinigitaj nacioj de Eŭropo. La poemo pravas, ke E. estas taŭga por esprimi verajn sentojn, dolorojn kaj esperon. Ĝia sento estas nacia kaj tamen Esperanta!

Kelkaj Vortoj pri la Uzebleco de Esperanto.

Ĉiuj konfesas, ke Esperanto estas lingvo por internaciaj interrilatoj. Kaj la tasko de ĉiuj esperantistoj estas, kiel eble plej baldaŭ disvastiĝi tiun ĉi lingvon en la tuta mondo aŭ atingi tion, ke ĉiuj ŝtatoj de la mondo alprenu Esp. lingvon kiel la internacian por la diversaj internaciaj interrilatoj.

Tamen tiuj vojoj, per kiuj oni volas Esperanton disvastiĝi, estas malsamaj, kaj en tiu ĉi rilato ne ĉiuj esperantistoj interkonsentas. Dum mia vivo mi estas vidinta tiajn fenomenojn, kiuj malhelpas aŭ akcelas la disvastiĝon de Esp. Dum la mondmilito mi loĝis en Moskvo (Rusio), kie kelkajn fojojn mi havis feliĉan paroladon kun pli famaj rusaj esperantistoj pri la celoj de Esp. Tiam, oni devas scii, patriota spirito estis pli grandiginta ĉe ĉiuj rusoj, kiuj precipe tiam malamis la germanojn tiel, ke tiam ruŝa registaro estis malpermesinta paroli germane ne nur sur la stratoj kaj publikaj lokoj, sed ankaŭ en hejmo inter anoj de familio. Kaj jen dum tiuj tempoj mi havis kelke da okazoj viziti la redakcion de „La Ondo de Esperanto“, ankaŭ ĉeesti la kunvenojn de rusaj esperantistoj.

Unu fojon mi ekdemandis: „Kial do La Ondo de Esperanto nenion skribas pri la milito kaj ĝiaj okazintaĵoj?“

Pro tiu ĉi demando oni respondis al mi, ke „La Ondo de Esperanto“ restas neŭtraleca, kaj ĝenerale la esperantistoj estas kontraŭuloj de ĉiuj militoj. Al mi ankorau oni rakontis, ke nur germanaj esperantistoj estas disrompintaj la idealon de esperantismo. Germanaj esperantistoj — laŭ tiuj personoj — en sia gazeto „Germana Esperantisto“ presigas militajn okazintaĵojn kaj eldonas ankaŭ specialajn militajn bultenojn.

Kvankam mi tiam ne estis ankorau vidinta nek „Germanan Esperantiston“ nek tiujn bultenojn, tamen mi opiniis alie. Mi penis pruvadi, ke la agado de la germanaj esperantistoj ne estas kontraŭa al esperantismo, sed male — ĝi helpas al la disvastiĝo de internacia lingvo, ĉar tiam Esp. lingvo enradikiĝas en la vivon, kiam la homaro vidas, ke por ĉiaspecaj internaciaj rilatoj plej

Ĉu longe furiozas la pereiga flamo,
Ke ankaŭ ami povas la hom' nur per malamo,
Ke amon al patrujo per tio li ekmontras,
Ke al nacio fremda malbenon fulmotondras?

Ĉu nin do turmentados eterne la malbeno,
Ke genton de la gento forbaras malkompreno,
Ke al aligentanoj la lango estas muta
Kaj, se parolas, sonas nur blasfemad' balbuta?

Cu do ankorau longe la hont' terura restas,
Ke hom' al homo lupu, kruela lupu estas,
Ke patro testaments malamon al la ido,
Ke venkas kaj triumfas rikone la perfido?

Ke ruz' diabla estas la diplomata moro,
Ke la mortigon lertan ornamas brila gloro?
Ke oni masbuĉadon en nom' de Di' aranĝas
Kaj ke la pli potencaj la pli malfortajn mangas?

Jen estas mi Hungaro per ĉiu bat' de koro,
Per ĉiu gu' de sango, per ĉiu gu' de ploro . . .
Mi forte radikigiĝas en kara ter' nacia,
El ĝi suĉita estas ja ĉiu forto mia.

Kaj volas mi, ke ĝia art', manier', kulturo
Kunbrilu en la pompo de l' paca mondkonkuro;
Ĉar per perejo ĝia pereus io bela,
Perdiĝus kvazaŭ unu kolor' de l' ark' ĉiela.

Etendas mi la brakojn por frata ĉirkaŭpreno
Malsate je konsento, softe je kompreno . . .
Kaj streĉas sin rigide al manoj miaj pacaj
Ne palmoj indulgemaĵ, sed pugnoj nur, minacaj.

Forsonas en dezerto la plorkontuzaj voko . . .
Ho mian sekan gorĝon kunpremas jam sufoko,
Detruas en animo terura kataklismo:
Amata mia lando baraktas en abismo!

Ho, super ĝia kapo glav' Damoklesa pendas,
Al la pli promesinto landpartojn oni vendas.
Kaj ploras, ĝemas, plendas la forŝiritaj korpoj,
Samkiel ĉe la tombo de la patrin' la orfoj.

Mi tamen ne blasfemas, malbenojn mi ne sendas,
Laciĝis jam la brakoj, de longe sin etendas.
Nun ilin, kun la lasta eksving' de l' malespero
Eklevas mi, krianĉe el maro de l' sufero:

Ho, vi spiri' benata de l' paca batalanto
Estingu la inferon de la nacia vanto!
Ekfulmu via lumo en malespera nigro,
Ke ekitiminte kuru la diskarnanta tigro.

La tigro verdokula de l' malkonkord', jaluzo,
De l' rabinstink' nacia, de la perfida ruzo,
Ke estu fine sekaj la fontoj de la ploro
Kaj unu la ŝafaro, kaj unu la pastoro.

Ke ŝultro ĉe la ŝultro laboru ĉiu lando,
Kunplektu ilin forte de l' amo florumando.
Sur via kun adoro florumanita tombo
Ekflugu kun sonanta flugil' la packolombo.

Kaj kiel Dioniza festen' per unu fojo
Ekmuĝu tra la fero la ditriamb' de ĝojo
Ke fine sub la signo de l' verdalama stelo
Alvenu, ho alvenu sur teron la ĉielo.

D-ro KOLOMANO de KALOCSAY.

taŭgas Esp. lingvo. Kaj tiam mi ankaŭ penis pruvadi, ke por esperantistoj de ĉiuj landoj nenio alia restas ol sekvi kaj agi laŭ ekzemplo de la germanaj esperantistoj, ĉar alimaniere la movado de esperantismo dum longa mondmilito devos ekhalti aŭ plimalgrandiĝi; post la milito do oni devos multe labori, por ke la esperantista agado restariĝu.

Post la milito mi revenis en mian patrujon, Litovion, kie sukcesis al mi ekvidi „Germanan Esperantiston“ (jarkolektoj), kiun irarigardinte mi konvinkigis, ke germanaj esperantistoj dum la mondmilito ne estis tiom kulpaĵ al la idealo de esperantismo. Ankaŭ mi konvinkigis, ke tia „neŭtraleco“ de rusaj esperantistoj nur haltigis la disvastiĝon de Esperanto en Rusio. Kaj tia situacio estis ne nur en Rusio, sed ankaŭ en aliaj landoj.

Nuntempe ne parolante plu pri pasintaj eraroj aŭ verol, ni devas pli atenti al la estonteco. Ne nomante aŭ montrante ĉiujn vojojn de disvastiĝo de nia kara lingvo, estas tre grava afero, laŭ mia opinio, presa vorto kaj povoscio aplikadi Esp. lingvon en la praktikaj vivo. Oni devas memori, ke ankaŭ hodiaŭ ekzistas tiaj homoj, kiuj opinias, ke Esperanto enhavas tre malmulte da vortoj, per kiuj ne povas esti esprimitaj ĉiuj pensoj, ke fine Esperanto estas neperfekta. Por disbari tiajn konvinkigojn, oni devas uzi ĝustajn rimedojn. Mi jam ne unu kontraŭulon de Esperanto aligis kaj konvinkis per simpla maniero pri la taŭgeco de Esperanto. Kiam ĉiuj aliaj rimedoj ne povis atingi sian celon, mi plej ofte faris tradukojn el iaj Esp. gazetoj kaj multajn el ili presigis en litova gazeto. Nur tiam tiuj kontraŭuloj estis venkataj, kaj multajn el ili, aliĝinte, komencis mem lerni Esperanton. Kial do tiel okazis? Tial, ke tiuj homoj konvinkigis, ke per Esp. lingvo oni povas esprimi ĉion, kion homa kapo kapablas elpensi aŭ pripensi tiel, kiel en sia patruja lingvo.

Konsiderante tiajn ĉi cirkonstancojn, niaj Esp. gazetoj devus skribi pli multe pri tiaj aferoj, kiuj nuntempe plej interesas la homaron, t. e. oni

* Ĉia perfekteco surtera estas nur relativa. Laŭ la opinio de multaj esperantistoj pli perfekta lingvo ol Esperanto estas tre bone imagebla. Sed lingvo tute ne bezonas esti perfekta, por ke oni povu per ĝi esprimi ĉiujn pensojn; kaj tiam oni povas en Esperanto eĉ ĝis alta grado.

RIM, RED.

devus traktadi socialan, politikan kaj kulturen vivon de la diversaj nacioj, landoj aŭ ŝtatoj, klasoj ktp. Tiam ia Esp. gazeto estus tiu fonto, el kiu fluus sciigoj, informoj kaj raportoj, kiuj nuntempe plimulto bezonas. Due, la esperantistoj mem devus ne nur okupi sin por disvastiĝi internacian lingvon, sed ankaŭ enigi en la arenon de la politika, kultura aŭ sociala vivo kaj iri antaŭen, ĉar nur per tia maniero ni ebligus pli rapidan enkondukon de Esp. lingvo en diversajn lokojn de homara vivo. Precipe en nuna tempo estas plej urĝa afero por publicistoj kaj ĵurnalistoj, kiuj unuaj devas montri al la tuta mondo, ke sen Esperanto ne estas ebla lo ajn internacia interkonsento aŭ interkompreniĝo kaj ekzistado de veraj devizoj.

Kaunas (Litovio), 27. nov. 1920.

A. KLIMAS,
redakcio „L. Ŭkininkas“.

Postkongreso kaj landa kongreso en Budapeŝt 1921.

La fremdul-oficejo de Budapeŝt intencas pro la tie okazonta postkongreso esperantista eldoni novan gvidilon tra Budapeŝt en Esperanto. Partoprenontoj alilandaj jam nun sciigu ĉefsekretariojn Aleksandro Laquer, VII, Kiraly u. 57-II. De Praha oni vojaĝos tien kune.

Glumarkoj de Postkongreso en Budapeŝt.

La hungaraj samideanoj intencas aranĝi post la XIII-a en Praha postkongreson en sia bela ĉefurbo Budapeŝt, pri kio aperis nun glumarkoj en ses koloroj, montrante la parlamenton en Budapeŝt. Riceveblaj 12 (du serioj) por respond-kupono, 100 por 1 svisa franko aŭ egalvalora papermono alilanda ĉe Paŭlo Balkanyi, Hungara Esp. Servo, Budapest VI, Hajos-utca 15-2.

Sepa Kongreso de Japanaj Esperantistoj en Tokio (1-3: Oktobro 1920).

Laŭ „La Revuo Orienta“ ni raportas jenon: La unuan tagon, vandrede, estis generala kunveno kaj labora kunsido je la 7-a vespere en „Gakusikai“, Kanda. Ceesiis ĉ. 30 personoj. Prezidis s-ro S. Macuba. Post malferma saluto de la prezidanto oni oficialigis la estraron de japana Esp. Instituto. Poste s-ro E. Asai raportis pri la kaso. La tuta enspezo de la fondiĝo de J. E. I. ĝis aŭgusto estis 1113,10 jenoi, tuta elspezo 929,69 jenoi. Pri la budĝeto por 1921 parolis s-ro K. Ossaka. Nun J. E. I. havas kapitalon de 200 jenoi; supozeble ni povos transporti 150 jenojn en la kason de 1921 el 1920, kaj ni povos akiri 140 novajn membrojn en 1921. Do la supozata enspezo en 1921 estos (el 25 specialaj, 550 ordinarij kaj 10 liceanaj membroj, plue el 140 novaj membroj, el reklamo, abononj eksterlandaj, vendotaj libroj, procentaĵo ktp.) 1740,00 jenoi.

El la dirita enspezo ni ankoraŭ ne povos havi nian propran oficejon kaj pagatan oficiston; ni ankoraŭ devas kontentigi nin per la nuna stato, ke kelkaj bonvoluloj oferu sian tempon kaj laboron tute senpage, kaj la membraro devas kontentigi per neperfakta administrado pro sia simpatio je tiuj noblaj sinferuloj.

La elspezoj por 1921 estis fiksitaj je 1790,00 jenoi. La mankon de 50,00 j. ni plenigos per monoferoj petotaj.

Sekvis salutoj de lokaj reprezentantoj (paroloj kaj telegramoj).

Poste oni transiris al la Labora Kunsido. Laŭ propono de s-ro K. Ossaka estis unuanime aprokata jena deklaro: La Sepa Kongreso de Japanaj Esperantistoj unuanime decidis deklari sian malaprobcon kontraŭ la landnoma sufikso „-i“, lastatempe provata de kelkaj samideanoj, ĉar ĝi kaŭzas konfuzon en nia lingvo, alportante nenion utilan.

Propono de s-ro ĵurnalisto J. Urata pri ĉambro en Kafejo „Rosia-ĵa“ kiel sociala klubo de Tokiaj samideanoj estis kun dankego aprokata.

Vigla diskuto fariĝis pri diversaj proponoj (propagando de japana Asocio por Ligo de Nacioj, aranĝo de ekspozicieto de Esperantaĵoj, raportoj pri Esp. movado por ĵurnalaj redakcioj, verkado de historio pri Esp. movado en Japanujo, starigo de japana Asocio kun oficisto pagata, eldono de ilustrata libro pri „Japanlando“, ŬEA ktp.). Bedaŭrinde, pro maltrua horo, ni devis ĉesigi la diskuton, aprobante ĉiujn ĉi proponojn, kvankam ne tiuj efektivegblajn por la ankoraŭ malfacila stato de nia afero en Japanujo.

La duan tagon, sabato, okazis publika kunveno kun propagandaj paroladoj, je 2 h. pm., en „Meiĝi Kaikan“, Kanda. Aŭskultis pli ol 600 personoj kun profunda atentemo kaj fervoro; precipe la lekcion de ambasadoro d-ro Ramstedt pri „Lando de Mil Lagoj“ interpretita de S. Ga kaŭzis intensan intereson.

Je 6.30 h. okazis komuna vesperranĝo en restoracio Macumoto, Kanda. Partoprenis 40 personoj, inter kiuj d-roj Nakamura kaj Kii, ambasadoro Ramstedt, ges-roj Roscoe, s-roj Eroŝenko, Serisef, kaj gesamideanoj el Jokohama. Ankaŭ ĉeestis kelkaj ĵurnalistoj. Parolis d-ro Nakamura kaj inĝ. Ossaka. La gaŭjegan vesperon finis solena kantado de „La Espero“ je la deka.

La trian tagon, dimanĉe, oni ekskursis al bela Kamakura. Kun fliranta verda standardo ekveturis goja rondo esperantista el Tokia stadidomo je 8.45 h. Ĉe Sinagaŭa kaj Jokohama aliĝis al ĝi multaj samideanoj. Bedaŭrinde pro difektoj en la fervojoj kaŭzita de la lasta uragano, la vagonaro veturigis ne tiel rapide de la gajaĵojn, sopirantajn al la bela marborda urbeto. Je duono post la 11-a, ni atingis la stacidomon Kamakura, kie nin renkontis marleŭtenanto Aŭaja, aviadisto. Ni tuj nin direktiis al Hase por vidi belan stacion de Budao.

Laŭ invito de majoro S. Kuroki, konfid. stabo de generalo Semijonov, nun restanta en bela hotelo Micuhaŝi pro malsano, la ekskursantoj kolektiĝis en la hotelo. La majoro, ravita per la ideo de lingvo internacia, regaligis nin ĉiujn per grandioza tagmanĝo. Tio estis tro bela neatenditaĵo en la programo. Pro la bonkora gastigado ni perdis la tempon viziti historiajn vidindaĵojn en la ĉirkaŭaĵoj, sed ni tamen ne bedaŭros pro tio, ĉar ni ja havis tro bonan tempon en la bela ĝardeno de la hotelo.

Survoje hejmen la vagonaro estis ja laŭlitere plenplena, kaj denove ni estis haltigitaj en stacioj Ohuna kaj Tocuka po du horoj. Tamen bone! La okazon ni ne forlasis: propagandis, propagandis sur la peronoj, eĉ benante la difektitajn fervojojn.

Sukceso! Sukcesego! Tio estis vorto ripetita dum la kongresaj tagoj. Vivu, kresku kaj floru la Verda Standardo!

Scienco.

NOVA KOMPRENDO DE LA VIVO KAJ ĜIA PRAKTIKA SIGNIFO POR LA HIGIENO.

(4-a daŭrigo.)

Jen antaŭ ĉio kelkaj plujaj konstatoj pri la malpliigo de la elektra disocio en 1^o/a kuirsalsolvajoj per alkoholdonado¹⁾. Por komparo apude estas videbla la miliamperkino ĉe egalgranda maldensigo per akvo. Apikataj estas absoluta alkoholo kaj akvo, disilita, kiuj ĉiu por si ne kondukas la fluan elektran

100 kcm da kuirsalsolvaj rezultas kun aldono de (en kcm):

Alkoholo	Miliamperoj	Akvo	Miliamperoj
—	12,0	—	12,0
0,5	12,0	0,5	12,0
1,0	11,5	1,0	12,0
2,0	11,5	2,0	12,0
4,0	11,0	4,0	12,0
6,0	10,5	6,0	11,5
10,0	10,0	10,0	11,0
25,0	7,0	25,0	10,0
100,0	3,0	100,0	7,0

La sangkvanto de plenkreskulo oni povas kontekti je 5 litroj. Se ni supozas, ke la miksada proporcio havas lokon glate kaj perunufoje, kio nature ne okazos spite la fortega ensufo de la alkoholo jam per la stomako-parioj, la sango entenus post entuscepto de

1 litro da biero ĉirkaŭ	0,6%	da alkoholo
post 5	1,8%	„ „
post 5	3,0%	„ „
post 1	1,8%	„ „

Laŭ sia hodiaŭa teorio la hemia afineco egalas la disocian gradon, ĉar nur aktivaj t. e. ionizitaj molekuloj, kondiĉas laboron heman. Oni do povas ankaŭ diri: La alkoholo malpliigas en solvaĵo la aktivajn molekulojn kaj pligrigas la ne-aktivajn, malpliigas ankaŭ la heman laboron kaj la stofspezon. Ekzemplo²⁾ pli bone ankoraŭ komentu la diriton:

Vojaĝanta metiisto dum granda malvarmo venis en gastejon por varmiĝi sin per brando. Ĉe-estantaj gastoj transdonigis al li multegon da brando, kaj fine, kiam li havas sufiĉe, ili verŝas al li eĉ fian en la buŝon por tute pleniĝi lin. La metiista junulo ekdormas, falas teren kaj kiam poste iu volas porti lin eksteren, li estas senviva.

En la sekcia protokolo vortigatas: Ĉe la esploroj de la kadavrejoj, pli malfrue aliritaj al ni, oni trovis pezprocentojn da alkoholo:

En la sango el la koro kaj la grandaj angioj	0,55
en partoj de la koro, pulmoj, omento kaj lieno	0,44
en stomako kaj ezoŝago kun enhavo	0,72
en la lumboj	0,37
en la urino	0,65
en la hepato kaj gala veziko	0,24
en la cerbo	0,42

Tiuj ĉi ciferoj havas nur intereson montrante, en kiuj organoj la rapide oksidanta alkoholo restas plej longe.

La morto de la junulo havas eble sekundaran kaŭzon, sed povas ankaŭ tute senpere esti efikata per la malfunkcio de la elektrolito. Tial la perfunkcia morto, kiu etiologie egalsignifas al la saltsaltsmorto.

Fakte la alkoholo malsolis al Hirth la pordon al la problemo de korpa funkciado forto. Iam li lernis, ke tiu ĉi fluidaĵo ne estas kapabla konduki la elektran fluan: sur ĉi tiu „onidiro“ li konstruis sian unuan projekton de atako. Jen, montriĝis, ke jam maldensigoj alkoholaj malpliigas la kondukan kapablon de nia salsero, tiel ke la iom ebrulo estas rigardota kiel malbona kondukilo. Sed kio valoras pri la fulmo kaj la fluo de la elektriza maŝino (tiel li diris al si), devas esti ĝusta, se ni imagas la propran nervsistemon elektran aparato. Tio ĉi akurate akordigis, ĉar la trinkado efektive malpliigas la rigardon super ni mem, forigas la malhelpojn, kiuj estas preskaŭ pli gravaj ol incitoj kaj ekscitoj.

Tria pruvo por la Hirth'a tezo de la elektrita funkciado estas la tielnomata saltsaltsmorto, kiu estas funkcia morto. Jen mi citas kelke da eksperimentoj de la fiziologo Forster³⁾:

„Kolomboj, kiuj estis mangantigitaj per salmarriĉa nutraĵo, pereis dum 13, 16, 19 tagoj; da same tiel mangantigitaj hundoj post 26 kaj 36 tagoj estis proksime de saltsmorte. Ĉar la bestoj troviĝis en azotekvilibrato, la morto nur estas rekondukebla al manko de cindreroj en la nutraĵo. Ties importu ne devas malleviĝi sub certa limo. Ĉe la tiebla forprenado de la mineraloj en la nutraĵo de plenaĝa besto, la procesuso de la ŝtofsanĝo, disfalas kaj malkompono en la korpo procedas sammaniere ĝis la morto de la besto, kiel ĉe ordinara, ĉiufanken sufiĉa nutraĵo. Tamen ekestas baldaŭ perturbadoj en la funkcioj de la organoj,

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Ruso eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Sidlovskaĵa.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (7-a daŭrigo.)

IV.

En la sepa tago falis sur la oceanon densega nebulo. Tia nebulo, ke la ŝipnazo ŝajne sin puŝadis kontraŭ blankan muron, kaj apenaŭ estis videbla la movado de la silentiĝanta maro. Du aŭ tri fojoj apud la ŝiprando preternagiĝis alĝoj, el kio Mateo konkludis, ke proksime estas Ameriko. Sed Dima sciigis per sia bohemo, ke ili troviĝas ĝuste en la mezo de l' oceano. Ne tre malproksime al sudo estas fundsablajo. Tie la varma marfluo frapas la sablaĵon kaj iras suden, dum de kontraŭa flanko venas la malvarma norda fluo. Jen estas la kaŭzo, kial ĉi tie super la maro ĉiam kuŝas nebulo. La ŝipego moviĝis malrapidege. Plende sonis ĝia laŭta fajflego, kaj la muro da nebulo reflektadis tiujn sonojn, kvazaŭ eho en densa arbaro. Tiam ĉi homo sentis malrankvilon, timon

En la sama tempo sur la ŝipego mortis viro. Laŭdire, li jam ensipiĝis malsana; post tri tagoj li fartis jam tute malbonege, kaj oni donis al li apartan kajuton. Lin flegis lia filino, juna knabino, kiu Mateo kelkfoje vidis kun larmantaj okuloj, kaj ĉiufoje lia koro dolore turniĝis en lia larĝa brusto. Fine, dum la ŝipego malrapide moviĝis tra la densa nebulo, rondiris famo inter la pasaĝeroj, ke tiu malsanulo mortis

Efektive, baldaŭ ĉiuj sur la ŝipego jam sentis la morton! La pasaĝeroj mallate interparolis, la kuracisto fariĝis serioza, malgaja, la ŝipestro interkonsiligadis kun sia subulo, kaj post unu tago oni entombigis la malvivulon en la maro. Oni envolvis la kadavron en blankan mortkilon, aligis ŝarĝon al la piedoj, iu sinjoro en longa nigra surtuto kun larĝa blanka kolumo — sinjoro,

kiu, ŝajnis al Mateo, tute ne aspektis kiel pastro.¹⁾ — legis preĝojn, poste oni metis la kadavron sur tabulon, la tabulon oni levigis sur ŝiprandon kaj post kelke da sekundoj meze de streĉita silento aŭdiĝis ekplaudo Samtempe la laŭte ekkriis: la juna knabino sin ĵetis al la ŝiprando, kaj Mateo aŭdis la patrolingvan krion: „Patro, mia patro!“ Sed la ŝipego, malrapide movante siajn ŝraŭbojn, estis jam for de la loko, kie la ondoj intermiksigiĝis kun la blanka nebulo. Ne restis eĉ unu posesiĝino de la homo La nebulo malantaŭ la ŝipego formis densan muron, antaŭe ankaŭ sterniĝis nebulo, kaj la ŝipa fajflego ĝemadis, kvazaŭ priplorante la malfacilan homan sorton!

Sed baldaŭ aliaj okazaĵoj lasis forgesi tiun morton. En la sama tago malgranda velŝipeto apenaŭ sukcesis forligi el sub lia ŝipnazo. Homoj, tie sidantaj, ŝvingadis siajn ĉapelojn kaj ridis, estante en la distanco de ĉirkaŭ kvin klafoj. Ili surhavis vakstolajn jakojn kaj ŝtrangformajn ĉapelojn Aliaj fojoj io pli malbona preskaŭ okazis. Meze de l' tago en la laktokolora nebulo la ŝipestro kredeble iun eksuspektis. Oni haltigis la ŝipegon, oni postenigis ĝin, kvazaŭ forkurante de io moviĝanta en la nebulo. Poste oni haltis plenatente. Subite Lozinski vidis supre, en la nebulo, kvazaŭ grandan nubon kun brilantaj randoj, sammomente la aero iĝis pli malvarma, akra venio ekblovis. La ŝipego sin turnis kaj malrapide kaj singarde, preskaŭ kaŝe ekrampis maldekstren en la densiĝintan nubon. Tie dekstre estis ne nubo, sed glacia monto! Lozinski ne kredis al siaj okuloj, vidante tiel grandegan monton el pura glacio. Sed ĉiuj sur la ŝipo ja vidis ĝin! Sur la ferdeko ĉio silentiĝis, eĉ la ŝraŭbego laboris pli malrapide, pli singarde. Dume la monto naĝis, iomete balanciĝante. Subite ĝi malaperis, kvazaŭ disfluidiĝis en la laktokolora nebulo

¹⁾ En Rusujo la grek-orjodoksaĵaj pastroj havas specialan vestaron, devigan eĉ por privata vivo.

(Daŭrigota.)

Recenzejo.

LIBROJ

Mala Recenzo.

Kara s-ro eldonisto!

Bonvole mi konfesas — kaj tute malkaŝe mi eldiras, ke unu el ni du (ne vi!) — aŭ H. S., la kritikanto de „Kristana Esperanto“, aŭ mi — aŭ Pardonu, mi komencu de la komenco.

Mi estas sufiĉe aĝa por plensci, kion mi speritis dumvivite; mi konscias, ke dum ĉi tiu traviva migrado mi iom lernis, multon forgesis, ne ĉion komprenis. Laŭstrate mi penis kredi, aŭ se tio estis ne adaptable al mia mentalo, mi dubis aŭ — ne kredis.

Unu el la faktoroj, kiujn mi bonkonscie povis kredi, ĉar mi ankaŭ intelektis ĝin, estas la ĵena: Arthur Schnitzler estas „unuaranga“ verkisto. Kaj ĵena: „La Verda Kakuto“ estas spritega kaj fuma groteskaĵo.

Tia estas la opinio de ĉiuj literaturkonantoj kaj „amantoj“ ĉie, kie oni konas germanlingvan literaturon.

Oni povas havi disajn idojn kaj juĝon pri la tendenco, sed ĉiam restas la granda valoro literaturo; tion ankaŭ kontraŭuloj volonte konfesos.

La subtitolo estas „groteskaĵo“, ne drameto.

Kion do signifas ĉi ĉi mistera „ĉiu-milareco“?

Kion signifas „la rozujo ĉiumiljara“? Kaj kion „la lingvo ĉiumiljara“? Ĉu la fama rozujo en Hildesheim kreskas, aŭ verdiras, aŭ floras ĉiun miljaron? Aŭ ĉi ĝi estas nur fantoma kreskaĵo aperanta al homaj okuloj interrompe nur en ĉiu mila jaro?

Kaj la lingvo „ĉiumiljara“ — ĉu oni ĝin eltrovas, aŭdas aŭ parolas ĉiu-miljare?

Kion do signifas ĉi ĉi mistera „ĉiu-milareco“?

Eble ankaŭ la „silo modeltaŭga“ estas „ĉiu-miljara, kaj ni bedaŭrinde legantoj vivas malfeliĉe ĝuste en la paŭzo inter la du misteraj „ĉiu-miljarecoj“ kaj al ni mankas la koncerna „ĉiu-miljara mentala organo.“

Ĉu eble ĵu el la legantoj povas sciigi min, kie la ruĝa buŝo de la bonkora „kreito“ Joline estas „aĉetita“? Ĉu ekzistas tia kanibala aĉetito? (Nur „aĉetito“?)

Volontege mi scias, kiun medion Granville „tra“tremis! Ankaŭ estas laŭdira, ke Joline svingas sian piedon nur „dum“ ĝi pendas super la maldekstra genuo (alĉie la ne-eviteblaj fantaziaĵoj de nepurulo ne estas elpensibla).

La „modeltaŭga“ silo estas por mi kaj aliaj simplaj karolingvanoj same nekomprenibla kiel Joline por Granville, kiu ankaŭ ne „scias“ ŝin — (ĉu vi eble la tradukinto?) —!

Mistera ankaŭ estas la ĉambro, pli mistera la mediumaj fortoj de Joline, ĉar ŝi ĵetas objektajn „ĉirkaŭ la ĉambro“ kaj „tenas“ pozon!

Simile mistera persono estas frato Augustino: li sin „donis“ al la monaĥejo (esperede ĉi tiu lin bone ricevis!) „Pri“ ĝi kaj ĝi ili estas ankaŭ malfeliĉe lerneblaj, same kiel „ĝi“ kaj „li“. (Pro tio verŝajne s-ro F. W. Hipsley preskaŭ proponas en n-ro 11-a de „Esperanto“ lerni ilin unue, antaŭ la aliaj pre-kaj sukceso!)

Nun mi trovas enigmon: „Sed ĵena Delia rekte de la Place de l'Opera ne estis facile devigata.“ Kiu helpos? — Due enigmo: ekzistas en la monaĥejo sentiva vivulo — „senspira“ monaĥo, kiu parolas per „spirantaj“ tonoj! Ĉi tiun „senspiran“ „spirante tonantan“, miraklan monaĥon Joline tentante per granda donaco subaĉetas tiel, ke li „spiregante“ foriras al la prioro! Se vi ne ĝuas ĉi tiun subaĉetitan modeltaŭgan, vi — „mulle“ perdos! (Kiamaniere, kiel, kion aŭ kion?)

Tria enigmo: Kio estas „robo de konfeso“ (por virino)? — Mi — kvankam katoliko — neniam vestis min per speciala robo por konfesi.

Kvara enigmo: La monaĥejo estas laŭdira tiel labrinta, ke ĝi bezonas specialan „evadistaron“. Eble tiu ĉi estas kapabla gvidi nin tra la modeltaŭga silo, la modeltaŭga kritikita pensmaniero de la kritikinto, kaj fine la tradukemuloj inter la rokoj „kvietaj“ kaj „senlaŭta“. Demandu „al li“, eble la respondo „alvenos de“ la peto.

Kvina enigmo: „Li ŝin penseme rigardis dum momento, liaj mirindaj maljunaj okuloj ĉioidantis en lia ameco.“ Eble vi trovos „laŭ“ la vojo al solvo kaj diros ĝin al mi per „ebenaj“ tonoj, se tio estas la „sendaĵo donota“ al vi.

Tio estas supra ekzemplo de la modeltaŭgeco en la unua parto — 20 katekizaj paĝetoj — de la rakonteto.

Ĉu vi, kara leganto ne sentas vin elĉerpata kiel Joline, kion oni en la dua parto vidas, kiel „ŝi firas plugilojn, jungite kun bovoj“ (do — gebovoj!); ĉu vi, atenta leganto, nun komprenas, ke verdire unu el ni du (ne vi!); aŭ la kritikinto de „K. E.“, aŭ mi, laŭ mia opinio, apartenas al tiuj — mi ne scias, ĉu feliciĝi aŭ bedaŭrinde homoj — pri kiuj ekzistas antikva sentenco: Kontraŭ eĉ la dioj vane lukstas!

Vi ridas? — Malpravaj! Ploru, ploru! Ĉar plorinda estas la fakto, ke ekzistas esperantistoj, kiuj portas tendencin okulkulvirojn, per kiuj tiuj „siloj“ fariĝas „modeltaŭgaj“.

Oni povas esti bonega prezidanto, sed tio nek pravas nek postulas, ke oni estas modeltaŭga tradukanto; la prezidanteco estas klara signo de persona taŭgeco.

ENIGMOJ.

Manuskriptojn de enigmoj oni bonvole sendi al S-ro Max Butin, Kronprinzenstr. 33, Bad Godesberg, Germ. SOLVOJ el n-ro 8.

1. Fundamento, 2. Urliko, 3. Novembro, 4. Danujo, 5. Alaŭdo,
6. Matematika, 7. Eduardo, 8. Nikelo, 9. Truto,
10. Ostracismo, — Fundamento.

Pen-te-kosto: Pentekosto.

Milono — milono.

- a) Dukato; b) Interlino; c) Mi ne estas surda.

NOVAJ ENIGMOJ.

1. konata eltrovinto
2. frukto
3. semajna tago
4. mambesto
5. veneno
6. floro
7. veturilo
8. birdeto

Anstataŭe la punktojn per literoj tiel, ke ili formu la nomitajn vortojn. Ankaŭ la unua vertikala vico montru la konatan eltrovinton. (Leono Funken.)

ANAGRAMO.

Alliokligu la literojn de felhava besto kaj estiĝos ilo. (M. Butin.)

ŜANĜENIGMOJ.

1. Kun „r“ terspeco,
2. Kun „n“ fiŝo,
3. Kun „a“ ekleziulo,
4. Kun „u“ juvelo.

[SOLVOJ publikigotaj en posta numero.]

Pri la literaturo valoro de l' rakonteto mi nur povas diri, ke ĝi egalas la kutimajn „magezin“ajn noveletojn.

Kaj ĉar mi malgraŭ ĉio volonte el lernado spertas, mi humile ripetis la lastan frazon de H. S. — sen timo, ke oni min akuzos por plagiato: „Ni do aĉetu kaj legu nur bonan literaturon, tiam ĉesos la eldonado de malbona simila“.

GAZETOJ.

ESPERANTA FINLANDO. Nov.

Interesa ilustrata artikolo „Pri fanna muziko“. Sukcesoj kaj malsukcesoj: La nova instruada ministro rifuzis pagi honoraron al la instruistoj instruantaj Esp., kion promesis la instruada eksministro. Do la enkonduko de Esp. kiel oficiala fakto ĉe la superaj lernejoj estas nebligita almenaŭ por la tempo, kiam la nova ministro regos. Ni kredas, ke tiu malsukceso ne senkuragiigos niajn finnajn s-anojn, kontraste ke ĝi instigos ilin al ankoraŭ pli forta agado.

FRANCA ESPERANTISTO. Okt.-nov.

Esperanto kaj naciaj lingvoj. Letero de s-ro Aulard pri Esp. Resumo pri la Esp. agado dum la Mondkongreso de la Internacia Asocio en Bruxelles. Konsiloj por la propagando kaj aliaj interesaĵoj.

HISPANA ESPERANTISTO. Julio-aŭgusto.

La gazeto havas la mankon, ke ĝi atingas nin du-tri monatojn post apero; ĝi enhavas legindajn artikolojn (J. M. Rosenbrin: „Konsento regu“ pri la landnoma lingvo) kaj belejn ilustraĵojn, kiuj bedaŭrinde ne estas sufiĉe zorgite presitaj, kvankam la papero estas bonega.

ITALA ESPERANTISTO. Nov. Oficiala organo de la Itala Esp. Federacio. Milano, via Spiga 29.

Unua numero eldonata de la estraro de IEF. Pro propagando celoj tute en itala lingvo. Raportas detale pri la kongresoj en Bologna.

LA SUDA KRUKO. Okt.

La gazeto estas sufiĉe bone redaktata kaj malgraŭ sia eteco tre diversenhava. Sed ni ne komprenas, kial oni uzas tiajn malgrandajn literojn! Aldone 4 pliajn paĝojn aŭ uzante pli grandajn formojn kaj ankaŭ pli grandajn literojn, la revueto certe gajnus kaj la kostoj tamen ne estus pli altaj, ĉar grandaj literoj kompostiĝas pli rapide ol malgrandaj kaj sparas laboron.

NA FOLIETO. Sept.-okt.-nov.

Lasta numero, ĉar depost nun realiros „Belga Esperantisto“. Ni ĝojas, ke la Belga Ligo Esp-ista iariĝis rez tiel forta, ke ĝi povas denove elrigi BE. „Nia Folieto“ certe multe helpis al la reorganizado de la Belga Ligo, kaj oni devas danki al ĝia fervora redaktinto, s-ro Hendrick, por lia bona prepara laboro.

NOVA TEMPO. Okt.-nov.

Rimarkinda artikolo: „Kosmopolitismo kaj Lernejo“.

VEGETARANO. Oktobro. Laren NH (Nederl.), Noolsche weg 390. Oficiala organo de la Vegetara Ligo E-ista. Du aŭ trimonata bulleto; membra kotizo kun abono jare 2 hol. guld.

Ni rekomendas al ĉiuj Esp. vegetaranoj la aligon al la ligo kaj la abonon al ties bulleto, nove aperinta post longa dormado.

Fervojistoj ĉiulandaj atentu!

Rilatas fakan vortaron!

Estimataj samfakanoj! Mi prenis sur min la taskon, prepari la eldonadon de faka vortaro por ni nepre necesa. La tasko ne estas facila, sed mi certe esperas, ke mi finos la komenciantan laboron, se ĉiu fervojisto-samideano helpos min. Do, kara kolegoj, se vi deziras, ke Esperanto fariĝu la oficiala ofica interkomprenilo, mi petas vin, helpu krei la verkon. Ĉar nur fiam ni povas realigi nian deziron, nur fiam ni konvinkos niajn administracianojn pri la utilo kaj la taŭgeco de nia lingvo, kiam ni posedas vere uzablajn fakajn vortaron, kiu enhavas ĉiujn esprimojn por la oficiala korespondado ofica necesajn.

Rekomendinda estas la starigo de komisiono de fakanoj konsistanta el la ĉefaj landoj. Do, kolegoj, kiuj intencas konstante kunlabori estas petataj sciigi al mi sian nomon.

La laboro estu jena: Ĉiu el la anoj de tiu komisiono traduku la diversajn regularojn, precipe kaj unue la „Internacian Konvencion pri la transporto de komercaĵoj per fervojo“ [Convention Internationale sur le transport de marchandises par chemin de fer], kaj la formularojn uzatajn en la diversaj partoj de la fervoja agado. Kolegoj, kiuj ne volas konstante kunlabori estas petataj traduki la fakesprimojn, kolekti kaj sendi ilin de tempo al tempo al la subskribinto. Sed evitu tro grandan specialecon; oni lasu la speciale teknikajn vortojn al la teknikistoj kompetentaj. Estas rekomendinde, ke kolegoj, kiuj scias la francan lingvon aldonu al la esperanta esprimo krom la nacilingva esprimo ankaŭ la francan vorton.

Ni devas rapidigi la laboron, por ke la vortaro estu prespreta ĝis la XIII-a en Praha.

Do, ni agu kaj laboru konstante kaj senhalte!

Ĉiuj gazetoj estas petataj represi ĉi tiun alvokon.

GEORG HABELLOK,

Breslaŭ 10 (Germ.) Schleiermacherstr. 19.

Mi akceptus

Reprezentadon

aŭ agentecon de eksterlandaj firmoj rilate importoj al

Hungarlando.

Georgo Steiner, Györ (Hung.) Kletzarstr. 12.

Abel-Kulturo.

Interŝanĝado de artikoloj pri abelkulturo deziras

Arthur R. Fairbairn

21, St. Marys Terrace, Ryton-on-Tyne (Anglio).

SILK-BRODAJON

REKTE EL ĤINUJO

mi sendas per rekomendita sendaĵo.

Belega manfarita. Skribu, kion vi ŝatas:

1. Esperanto-brodajo montras surskribon „Esperanto, Lingvo Internacia“ la verdan stelon kaj la tutmondon; 2. floroj, 3. birdo, 4. besto, 5. vidaĵo, 6. arbo.

15 : 20, 20 : 30 cm 25 respekt. 45 resp. kup. afrankite. — Sendu 1 resp.-kup. por specimeno. Skribu en Esp. al s-ro

C. S. Gee, Chatsaloon, Mokadee, Hai-Yen (via Shanghai), Ĥinujo.

Komerc-Agentejo

de Dipl.-Ing. P. Tarnow, Kiel (Germ.)

Olshausenstr. 18.

prizorgas ĉiajn maŝinojn kaj teknikajn.

Specialaĵoj:

Foder's ŝpar-kuirplataĵoj

por ĉiu elektrika tensio (110 kaj 220 Voltaj) tuj liverebaj.

Lavtabulaĵoj kun zink-lamena enmetajo.

Tré moderaj prezoj. — Pogrande speciala rabato.

„Nove Tory“

(La Novaj Vojoj)

aperas merkrede kaj sabate en lingvo pola kaj Esperanto.

Plej ŝatata kaj legata gazeto de Polujo.

Redaktoro: Prof. L. Kronenberg.

Adreso: Bydgoszcz (Bromberg), Polujo.

Abonpago por eksterlando laŭvola.

Korespondadoj el tuta mondo tre dezirata.

Anoncoj en „Nove Tory“ donigas al la tutmonda komercistaro mendojn el tuta Polujo.

Prezo de anoncoj por eksterlando laŭvola.

Oni sendu abonpagon kaj anoncajn mendojn je la adreso: Bank Zwiazka Spotek zarobkowych, Bydgoszcz, Polujo, konto de prof. L. Kronenberg.

Petu specimenon!

AĈETO. Jozefo Major, Remetestr. 36-II-4, Budapeŝt IX, deziras aĉeti, interŝanĝi aŭ prunte ricevi la sekvantajn E-ajojn: ĉiusepacaj fakaj terminarioj (matematika, mariste, anatomia ktp.), teknikaj kaj sciencaj vortaroj, Divna Vortaro de Boitrac.

BIALYSTOK, la Zamenhofa naskiĝurbo. 4 piva, kolorigitaj vidaĵoj kun Esp. teksto estas riceveblaj por 5 resp.-kup. Adreso: J. Sapiro, Lipowa 35, Bialystok (Pol.).

FILATELISTO. Mi povas tuj liveri al propagandaj filatelistoj antikvajn kaj maloftajn polajn poŝtmarkojn; ekzistas diversaj ĝis 25 serioj. Ankaŭ mi havas kvanton ukrainajn, finlandajn, rusajn, jubileajn ktp. Pago per papermono, respond-kuponoj aŭ ne stampitaj poŝtmarkoj. Adolfo Oberstman, Varsovio (Pol.), Krak-Przedm. 10.

HUNGARA ESPERANTO SERVO en Budapeŝt petas ĉiujn, kiuj ion skribas aŭ sendas al ĝi, ke ili skribu la tutan adreson: Pablo Balkanyi, VI, Hajos-utca 15-II, kaj oni sendu rekomendite. Alimaniere estas ne certa la ricevo.

INTERŜANGO. Max Butin, Godesberg (Rheinland), Germ., interŝanĝas eksterlandajn PM. Li nur akceptas eŭropajn. Respondoj ĉiam kaj tuj.

KOLEKTISTOJ! Mi vendas 25 malsamajn n-rojn de „La Spritulo“. Sendu proponojn al s-ro Max Butin, Godesberg (Rheinland), Germ., Kronprinzenstr. 35.

KOLEKTANTOJ DE HELPMONO! Mi deziras rezarzojn de ĉiulandaj helpmono, precipe de Germanujo (Orient-prusio 1914, helpmono de la militkapitejoj, porcelanono de Meissen ktp.), interŝanĝas kontraŭ aŭstria helpmono. O. Paril, Postfach 46, Graz (Aŭstrio).

KOMERCISTOJ el ĉiuj landoj, kiuj deziras aĉeti francajn komercaĵojn kaj produktajn, turnu vin al s-ro Maurice Ladrière, 6, rue Auguste Chabrières, Paris 15-e (Franc).

OFICO. 30-jara pola samideano, 15-jara praktiko komerca kaj oficeja, 4 lingvoj, sperta komercisto, unuaranga atestoj kaj rekomendoj, serĉas oficon kun certa estonteco en ĉiu lando. Havigos rekomponon al kiu helpos en tiu serĉo. — Ofertojn oni dumo povas direkti laŭ adreso de Adolfo Oberstman, del.UEA, Varsovio (Pol.), Krak-Przedm. 10.

POSTKARTAN VESPERON aranĝos komence de januaro la E-grupo de Koblenzo. Gesamideanoj ĉiulandaj, bonvolu sendi il. PK kun markoj bil. al la sekretario, s-ro Leono Funken, Florinsmarkt 7 a. l. Koblenzo, Germanujo.

SAKO. Luigi Puppo, via del Bragone, 1-3, Genova-Sturio (Italio) volante sin perfekti en la ŝakludo, deziras fari ludojn kun gesamideanoj per korespondado (L. k. c.).

DEZIRAS KORESPONDI:

Paŭl Mihe, Hagen i. W. (Germ.), Minervastr. 1, deziras interŝanĝi ĉiulandajn il. PK kaj L. kun samideanoj.

4 junaj, blindaj samideanoj deziras korespondi kun ĉiulandaj vidantaj kaj blinduloj. Adreso: Budapeŝt VII, Mexikbisir. 60, Izraelita Instituto por Blinduloj.

Heinr. Steinbrenner, Ziegelhüttenweg 1, Frankfurt a. M.-Süd (Germ.), Pl. L. kun ĉiuj landoj.

Wilh. Naiale, Sridelstr. 6, Frankfurt a. M.-Süd (Germ.), Pl. L. kun ĉiuj landoj, korespondas pri specialaj temoj.

Adolfo liter, Brahmsstr. 6, Frankfurt a. M. (Germ.), Pl. L. preferi pri lando kaj popolo, moroj, politiko ktp.